RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
04/12/2015 08:13:44

Basbalo: MLB bonvoleme vizitos Kubon favore al longa kaj forta rilato.

La organizaĵo de la aĝaj ligoj de basbalo de Usono (MLB) kaj ties asocio de basballudistoj plenumos turneon de bona volo en Kubo de la 15-a ĝis la 18-a de decembro, kiu markos la unuan viziton de tiu organizaĵo al Kubo ekde 1999, kiam la teamo *Orioles de Baltimore* ludis prezentan ludon kun la nacia teamo kuba.

Du atletoj kiuj membras en la Famo-Halo: Joe Torre, supera oficialulo de la MLB kaj Dave Winfield, speciala konsultanto de la MLBPA, iros kun grupo de basballudistoj al Kubo, estis anoncita en Nov-Jorko.

Ilia vizito inkluzivas gazetaran konferencon en la Hotelo *Nacional* kun Joe Torre, Winfield kaj la ceteraj sportistoj; ili faros klinikojn de basbalo por infanoj en la stadiono *Latinoamericano* de Havano kaj en la stadiono *Victoria de Girón* en la provinco Matanzas; plus karitata evento kune kun la asocio kuba *Caritas.*

La komisiito pri basbalo Robert D. Manfred, Jr. esprimis ke “basbalo reprezentas ligon inter niaj kulturoj kaj ne kontesteblas la influoj de kubaj ludistoj en nia sportludo. Mi esperas ke tiu ĉi turniro marku la komencon de longa rilato”.